# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por Esperanto

Prezidanto : M. CUENÉ - 26, rue Engel Dollfus - 68 - MULHOUSE

Sekretario : J.-P. COLNOT - 15, rue de Lavaux - 54-LAXOU (M.M.)

Kasisto : J. CHAPELLIER - 109, avenue de la Malgrange -54-JARVILLE
CCP - 399-75 NANCY

Junulara Respondeculo : R. KUBLER - 20, rue du Ruisseau - RODEREN - 68-THANN

N° 57 - DECEMBRO 1967

ĜOJOPLENAN KRISTNASKON

F E L I Ĉ A N N O V J A R O N

kaj B O N A N S A N O N por 1968 !

deziras al vi la Komitato de la Orientfranca Federacio kaj la redakcio de la Informilo.

## Profesoro Alfred KASTLER, Nobelpremiito pri Fiziko, Honora Prezidanto de la Kultura Esperanto Centro de GUEBWILLER

Okaze de la akcepto en la urbodomo de Guebwiller de la partoprenantoj al la Internacia Esperanto Kunveno (2an kaj 3an de septembro), Sro E.Wermelinger, en ĉeesto de la Sub-Prefekto de Guebwiller, de la Vic-urbestro, de diversaj lokaj eminentuloj kaj de ĉirkaŭ 50 samideanoj, anoncis oficiale, ke Profesoro KASTLER akceptis la honoran prezidantecon de la ĵus kreita esperanto-centro de sia naskiĝurbo.

Alfred KASTLER, kvankam ne estante esperantisto, jam delonge konatiĝis kun la lingvo. Antaŭ 30 jaroj, li ĉeestis prelegon de F-ino ZAMENHOF, en Bordeaux, kaj li bone rememoras ke ŝi tre brave diris france : "Quand deux ânes de pays différents se rencontrent, ils se comprennent ; il devrait, à plus forte raison, en être de même pour les hommes". Sed Profesoro KASTLER pli bone ekkonis esperanton dank'al lia "Majstro" : S-ro Profesoro Aimé Cotton, tre fama fizikisto kaj ankaŭ tre fervora samideano.

Al S-ro WERMELINGER, li sendis la libron "Aimé Cotton - l'optique et la Magnéto-optique par Eugénie Cotton - Édition Seghers Paris 1967" kies antaŭparolo li skribis. En la libro, ofte la vorto "esperanto" revenas kaj eĉ fina ĉapitro strebas varbi interesulojn por nia lingvo ! Tre taŭga libro por nuntempaj sciencistoj aŭ sciencemuloj.

La apogo al esperanto de tia eminentulo, kia estas S-ro KASTLER, nur povas generi fruktodonajn rezultojn por la varbagado, kaj tio jam efektiviĝis en Guebwiller, kie la lokaj gazetoj tre favore kaj fervore raportis.

Parte, ni ŝuldas tiun sukceson al F-ino Horrenberger Emilie el Guebwiller, estrarino de la Kultura Centro ; ŝi estas granda amikino de Profesoro Kastler, kaj per ŝi ni atingis lin. F-ino Horrenberger estis, jam antaŭ la milito, tre aktiva esperantistino kaj sekretariino de la francaj esperantistaj instruistoj.

Dankon pro ŝia helpo !

E. WERMELINGER.

## FEDERACIA INFORM-SERVO

La Federacia Inform-Servo, kiun mi planis starigi de pli ol unu jaro, ekfunkcias kun 6 departementaj respondeculoj en nia Federacio. Du aŭ trifoje monate, ni sendas komunikojn al la sekvantaj regionaj gazetoj : l'Est Républicain (Nancy), Le Républicain Lorrain (Metz), La Liberté de l'Est (Epinal), L'Alsace (Mulhouse), les Dernières Nouvelles de Strasbourg kaj le Nouvel Alsacien pere de Agence France-Presse (Strasbourg), Lorraine d'Aujourd'hui (Katolika, semajna, Nancy) kaj Le Journal de Lunéville (semajna, Lunéville). Car la grava Est Républicain posedas 20 eldonojn en 8 departementoj, ni ankaŭ sendas komunikojn al "Les Affiches de la Haute-Saône et du Territoire de Belfort" (Lure), Le Comtois kaj Les Dépêches (Besançon). Ni havas do krome 2 kunlaborantojn en Franĉkonteo.

Jen la nomoj kaj adresoj de la kunlaborantoj de F.I.S. :

| | | |
|---|---|---|
| Meurthe-et-Moselle | : | Esperanto-information, Maison des Jeunes et de la Culture 27, rue de la République - 54 NANCY - |
| | | S-ro J.P. COLNOT, 15, rue de Lavaux - 54-LAXOU |
| Meuse | : | S-ro Pol DENIS, Chemin de Blamecourt - 55-BAR-le-DUC |
| Moselle | : | S-ro Jacques MANCEAU, 14, rue de la Mine - 57-CREUTZWALD |
| Bas-Rhin | : | Esperanto-Information, S-ro KNECHT, 1, Place Mérian - 67-STRASBOURG |
| Haut-Rhin | : | Esperanto-Information, S-ro LIENHARDT, 24, Faubourg de Riedisheim (tél. 46.22.01) - 68-MULHOUSE |
| Vosges | : | F-ino A. JACQUOT, Vallon St-Antoine - 88-EPINAL |
| Doubs | : | S-ino J. TRESORIER, Lotissement du Chanois, Chalezeule- 25-ROCHE-LEZ-BEAUPRE. |
| Haute-Saône | : | S-ro G. JUNIER, 67, faubourg des Perrières - 70-GRAY. |

Ĉiujn komunikojn ĝis nun kompilis S-ro MANCEAU. Krome li mem tajpis kaj multobligis ĝis nun 6 cirkulerojn el 8 ! En Nancy ni multobligis la 2 unuajn cirkulerojn kaj specialan cirkuleron por prezenti ĉiun komunikon al la gazetoj. Ni prizorgas la dissendon al la diversaj gazetoj.

La unua dissendo okazis la 27/9 kaj 3 tagojn poste "L'Est Républicain" enpresis en siaj 20 eldonoj dukolumnan 44-linian artikolon pri helpo de S-ro MANCEAU al Bulgarino sub granda titolo "Retrouvailles fraternelles grâce à l'espéranto".(Vi retrovos ĝin resumitan en "Esperanto-actualités"). La gazeto aldonis la kompletan liston de niaj kunlaborantoj. Tiu artikolo havis sur la publiko verŝajne grandan sukceson, sed ne en la dezirita direkto... Neniu informpeto pri Esperanto atingis nin, sed en la kelkaj tagoj kiuj sekvis, alvenis helpopetoj : S-ro Pol DENIS ricevis peton el vidvino, kies frato perdiĝis apud Lure (Hte-SAône) antaŭ 20 jaroj (!) ; S-ino TRESORIER ricevis peton el persono, kiu serĉas perdiĝintan pastron ! Kaj S-ro JUNIER ricevis 2 petojn : unu el sinjorino, kies filo malaperis en Hindoĉinio antaŭ 20 jaroj, alia el alĝeriano, kies frato perdiĝis en 1961 !!

Mi informis pri tio "L'Est Républicain", kaj ĵurnalistoj vizitis S-ron DENIS. Bonega artikolo en la 20 eldonoj, regiona paĝo, sekvis pri helpo de S-ro DENIS al alia Bulgarino : ĉirkaŭ 40 linioj sub foto kaj granda titolo "Grâce à l'espéranto une petite Bulgare sauvée par un Barisien" (Temis pri sendo de medikamento).

De post tiam, S-ro JUNIER, al kiu S-ro DENIS transdonis la unuan peton, sukcesis retrovi la perdiĝintan fraton (kun edzino kaj 5 infanoj)....

Sed, krom tio, ŝajnas ke neniu el niaj aliaj informoj aperis en iu ajn gazeto ! Neniu informis min pri trovita artikolo.

Mi petegas ĉiujn samideanojn bonvoli informi min, se eble kun aldono de gazeteltranĉajoj, pri la artikoloj, kiuj eventuale aperus en la diversaj gazetoj.

Jen la resumitaj titoloj de diversaj komunikoj senditaj : "Nouveau lectorat d'Espéranto dans une université polonaise, projet du parti socialiste (Japonais) pour introduire l'Espéranto à l'école primaire , brochure en Esperanto du gouvernement danois,

...

disques en Esperanto, Espéranto et Technique, Esperanto et le livre rouge de Mao, Esperanto et tourisme, Esperanto et radio-amateurs, Esperanto et exposition de Montréal, Esperanto langue officielle en Allemagne, films en Esperanto, Esperanto et chanson, Esperanto et brochures touristiques, Nouveaux dépliants touristiques en Espéranto, Espéranto et télévision, Espéranto et ornithologie, Espéranto et religion, Nouvelles scientifiques de Chine par l'Espéranto, Nouvelles scientifiques et techniques (Chine et Bulgarie), Espéranto et Université, Espéranto et Jumelages, Espéranto langue maternelle, Espéranto langue-pont, Espéranto et guerre, Espéranto à la bibliothèque universitaire de Sarrebruck, Le prochain congrès à Madrid, Espéranto et philatélie".

Kelkaj ekzempleroj de tiuj cirkuleroj restas disponeblaj kaj mi volonte sendos ilin al aktivuloj, kiuj interesiĝas.

Post tiu monto kiu naskas muson, post tiu granda laboro por aperigo de nur 2 (bonegaj, sed nur 2 !!) artikoloj, oni povas miri, ke en la alzacaj gazetoj konstante aperadas informoj kaj komunikoj pri lokaj aŭ regionaj Esperanto-eventoj, kiuj aperas dank'al la agado ĉefe de S-ro LIENHARDT, sed verŝajne ankaŭ de S-roj KUBLER kaj GROSSMANN.

Montriĝas pli post pli, ke ĉefe tiaj lokaj kaj regionaj informoj interesas la gazetojn : Tial mi petas ĉiujn aktivulojn, ĉiujn delegitojn de U.E.A. bonvoli konigi al mi ĉiujn servojn, kiujn ili ĵus faris dank'al Esperanto, ĉiujn eventojn en kiuj utilas Esperanto, ĉar nur konkretaj faktoj en proksima regiono povas trafi la ĵurnalistojn -kaj la publikon !

Mi ne forgesu mencii la agadon de S-ro JUNIER, kiu ĉiusemajne aperigas artikolon (ofte ampleksan) pri sia agado en la loka rubriko de la gazetoj legataj en Gray.

Ĝis nun ni tamen daŭrigas la dissendon de niaj komunikoj, kvankam ĝi estas temporaba kaj kosta por niaj financoj, sen videbla palpebla rezulto. Pere de F.I.S. ni ankaŭ dissendis 70 ekzemplerojn de la lasta "Esperanto-actualités". Ni rajtas esperi, ke se unuaj grajnoj perdiĝis, la sekvontaj trovos grundon pli fruktodonan.

J.-P. COLNOT.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## NIA FEDERACIA KONGRESO 1968a

La Nacia Kongreso okazos dum Pasko (13a ĝis 16a de Aprilo 1968) en AIX-EN-PROVENCE Ni konsilas al ĉiuj niaj membroj, kiuj tion povos, partopreni amase tiun nacian eventon, en kiu U.F.E. solene festos la 70an datrevenon de sia fondiĝo.

Nia Federacia Kongreso devige okazos antaŭ la Nacia, do antaŭ Pasko, en Strasbourg- Pri la definitiva dato kaj la programo ni informos vin en nia proksima Informilo, kiu aperos verŝajne fine de februaro.

Por jam prepari tiun Federacian Kongreson, ni publikigas en tiu-ĉi Informilo la agadraporton kaj la financan raporton pri la pasinta laborjaro (1.10.66 ĝis 30.9.67) por konformiĝi al la nova laborjaro de U.F.E. Tiuj 2 raportoj (kiuj cetere aperos en la Jarlibro de U.F.E.) utilos kiel bazon de diskutoj por nia Federacia Kongreso. Ni tiam nur kompletigos ilin per lastmonataj informoj.

-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-

## FEDERACIA AGADRAPORTO PRI LA JARO 1966-67 (1.X.66 ĝis 30.9.67)

Ĝenerala trarigardo - Nia Federacio, kiu nur vivetis de multaj jaroj, ŝajnis preta revekiĝi dum la ĵus pasinta periodo. Al raporto ankoraŭ pesimista dum nia aprila kongreso, mi nun aldonos pli ĝojigajn notojn.

Tiu ŝanĝeto videblas ne laŭ la vidpunkto de la membronombro (112 membroj en 1965, 84 en 1966, 88 ĉi-jare), sed laŭ la ĝenerala aktiveco de la membroj - Tion ni ŝuldas al la juna generacio, kiu aperas en diversaj urboj -junaj homoj, kiuj nun "vivas sian Esperanton" anstataŭ ĝin balbuti nur unufoje jare dum tradicia Federacia Kongreso. Semajn-finaj renkontiĝoj multobliĝis (8 ĉi-jare), el kiuj 2 junularaj kaj 1 internacia, krom la federacia kongreso, kun ĉiufoje 10 ĝis 50 partoprenantoj, ofte kun translimaj najbaraj samideanoj, ĉefe svisoj, sed ankaŭ italoj, germanoj, hungarino, japanoj). Same ekfloras individuaj eksterlandaj vojaĝoj.- Du el niaj membroj sidas en la konsilio de U.F.E. de multaj jaroj, kaj nun 2 junuloj eniris en la nacian komitaton de JEFO. ...

Grupoj.- Grupo oficiale aliĝinta al la Federacio ekzistas nur en Strasbourg, kun 25 membroj. Kultura Centro stariĝis en Guebwiller. En Nancy oficiale ekzistas la Esperanto-sekcio de la Junuldomo (3 membroj). Kun 15 ceteraj membroj de UFE en Nancy kaj ĉirkaŭurbo, iom da kunlaboremo ebligus restarigi la nancian grupon kiel "Kultura Centro". En Thann junulara grupo fakte ekzistas kun 10 membroj kaj ĝia oficialigo estas proksima. En Mulhouse, en Epinal, en Bar-le-Duc, oni atendas revekiĝon de grupoj. En Bruyères, la situacio estas iom alia : kursoj okazas en la liceo kaj tuŝas multajn profesorojn kaj lernantojn, ekzistas do kerno da esperantistoj, kiun oni ne povas tamen nomi "grupo".

Informado.- Post unujara preparlaboro, ni ĵus starigis Federacian Informservon kun respondeculo en ĉiu departemento, kunlabore kun samideanoj en Franĉkonteo. Tiu informservo dissendos dufoje monate ĝeneralajn informojn pri Esperanto al 11 regionaj gazetoj. Unua dissendo okazis la 27-an de septembro, kaj unua tre favora artikolo aperis la 30-an.

Antaŭe, malpli sistema dissendo de komunikoj okazis el Nancy (dum la jaro 41 komunikoj al regionaj gazetoj kaj 32 pri loka agado), en Mulhouse, en Thann kaj en Strasbourg (sed mankas statistikoj).

En Guebwiller okazis tre efika propagando per paneloj en magazenoj, kaj la preparo kaj prezentado de diapozitivoj pri Florvalo, estis ankaŭ bona propagando, same kiel la internacia renkontiĝo en Thann-Guebwiller.

Instruado de Esperanto.- Parolaj kursoj okazis en Strasbourg (15 lernantoj), en Bruyères (18 elementaj lernantoj kaj 14 en duagrada kurso en la liceo), Mulhouse (13 lernantoj en la Popoluniversitato), Guebwiller (-ĉirkaŭ 20 lernantoj), en Thann (6 lernantoj).

Koresponda kurso, kun 10 gekunlaborantoj en 8 departementoj, funkcias en Nancy, sed ĝi sukcesis varbi nur 6 lernantojn de unu jaro.

Varbado de membroj.- Ĉiam eta sed konstanta ĉiujara varbado en Strasbourg ; krom tio, stagnado de unua jaro.

Delegitaro de U.E.A.- 18 personoj plenumas 26 delegitajn servojn.

Nia bulteno.- La Informilo, aperis 3 foje dum la jaro.

-=-=-=-=-=-=-=-=-

NIAJ RENKONTIĜOJ KAJ EKSKURSOJ

Nia programo de renkontiĝoj kaj ekskursoj estis dum la pasinta jaro tre ampleksa. Entute okazis 8 renkontiĝoj el kiuj 2 junularaj, kaj 1 internacia, plus la Federacia Kongreso.

Jam aprile, junulara renkontiĝo en Bruyères kunigis 14 partoprenintojn el Thann, Guebwiller kaj Bruyères. Ni jam raportis pri nia Federacia Kongreso, kiu kunigis ĉirkaŭ 50 personojn el la tuta Federacio kaj el Svisujo ; pri la maja renkontiĝo en La Hingrie kun 35 partoprenintoj el la ĉefaj urboj de nia Federacio ; pri la junulara renkontiĝo en Thann la 11/6 kun deko da gejunuloj el 4 urboj ; pri la ekskurso al Haut-Barr la 18/6 kun 16 partoprenintoj. Ĉi-poste sekvas raportoj de partoprenintoj pri la "familia" renkontiĝo en Le Lyaumont la 2/7 ; pri la internacieca renkontiĝo en Hahnenbrunnen la 19-20/8, kun preskaŭ 20 partoprenintoj el Thann, Guebwiller, Mulhouse, Nancy, Raon-l'Etape kaj ..... Tokio !

Pri la grava Internacia Renkontiĝo en Thann-Guebwiller la 2-3/9 ; fine pri la ankaŭ internacieca renkontiĝo en Haïcot-Le Bonhomme la 30/9-1/10, kun ĉirkaŭ 20 partoprenintoj el Thann, Guebwiller, Mulhouse, Strasbourg, Kirchberg, Nancy, Parizo kaj Tokio.

Konklude mi reprenos la vortojn de nia samideano Jasujuki Suzuki el Tokio : "Estas tre bone por esperanto, ke ofte okazas tiaj renkontiĝoj". Ni daŭrigu la venontan jaron !

J.P. COLNOT.

DEZIRAS KORESPONDI :

BULGARUJO - Fr-ino Vinitca KANIVA - 2, Bd. Vassil Apprilov - PLOVDIV.
13 jara, deziras korespondi kun franca knabino, franclingve.

SOVETUNIO - Fr-ino Velga HOLMA - Uzvaras, 39 - DOBELE (Latvio-USSR.)

LE LYAUMONT-

Renkontiĝeto okazis la 2an de Julio sur la esperantista kampadejo de nia amiko MANGEL. Malgranda kunveno sed tamen interprovinca ĉar ĉeestis familio COLNOT kaj Fabiano CHANUT el NANCIO, familio JUNIER el GRAY kaj S-ro MANGEL kag ges.AUBRY, liaj gefiloj, el Le Lyaumont.

La tuttaga restado estis amika, ripoziga kaj fruktodona ĉar multaj ideoj, spertoj kaj informoj interŝanĝiĝis.

Konklude : tre agrabla tago kun pikniko, muziko, kantoj, fotografado kaj ĝisrevida honorvino en la hejmo de S-ro MANGEL.

Géo.JUNIER.

ĈE LA PASEJO 'HAHNENBRUNNEN (19-20 aùgusto 1967)

Ĉu lignodometo, ĉu tendumejo por renkontiĝo, vere la loko estas belega, kaj ni estas bonakceptitaj de F-ino DORIS, respondeculino de "Touring-Club de Mulhouse".

Finiĝas la posttagmezo sabaté..., la partoprenantoj elektas liton en la dormejo aù instalas la tendon sur la herbejo, kaj ludas al "Volley-Ball" ĝisnokte. Post la vespermanĝo ni aùdas sonbendon registritan de S-ro Atsuo-Ooba el Tokio, dum la U.E.A.-Kongreso en Rotterdam.

Ĉiuj, pli aù malpli frue, enlitiĝas, kaj dormas pli aù malpli longtempe. Dimanĉe matene kvankam nebulas, ni ekskursas aùte ĝis la piedo de "Grand Ballon", kaj ni piediras ĝis la supro (1 424 m). Anstataù grandiozan pejzaĝon, ni nenion vidas, kaj preskaù ne povas vidi unu la alian, pro la dika nebulo ! Feliĉe per esperanta aùdeblo ni divenas, kie situas la akompanantoj ! Ankaù ni tremetas ĉe la monumento al la "Bluaj Diabloj" ; ne pro la Diabloj, sed pro malvarmeco !

Tagmeze ni denove estas en la lignodometo de Hahnenbrunnen ; aliaj partoprenantoj alvenis dum la mateno, kaj ni estas 19 ĉe la sama tablo por manĝi.

Posttagmeze, malgranda promenado en la proksima arbaro : kelkaj mirteloj ne plu restos longe sur siaj branĉetoj...

Je la 16a horo, ĉiuj intencas forlasi la pasejon, dezirante, post 2 semajnoj, denove renkontiĝi en Buhl ; ĝis la revido !

Tenduminto : F.C.

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

INTERNACIA RENKONTIĜO EN ALZACO

La 2an kaj 3an de septembro lasta, ĉirkaù 50 gesamideanoj (el kiuj 2/3 de junuloj) partoprenis la renkontiĝon bone organizitan de niaj aktivaj amikoj S-ro Wermelinger (Buhl) S-roj Grossmann kaj Kubler (Thann). Italio kaj Svislando tie estis reprezentataj, same bone kiel interalie la urboj Mulhouse, Strasbourg, Nancy, Gray, ktp... kaj eĉ Parizo !

Sabate en Thann : Oni akceptis nin en "Syndicat d'Initiative" por matenmanĝi antaù la vizito de la Preĝejo Sta-Thiebaut, Dank'al samideanino el Torino, ni ne forgesis rigardi kuriozajn lignajn personetojn en la ĥorejo. Poste, ni surgrimpis ĝis la restaĵoj de la kastelo Endelburgo nomataj "Okulo de la sorĉistino". Je la 12a, ni renkontis Esperantistojn el Gray antaù restoracio en Vieux-Thann, kaj kune ni veturis ĝis la tombejo "Vieil Armand" kiu troviĝas en la montaro, tie mortis multe da francoj kaj germanoj dum la unua mondmilito. Tagmeze je la 16a, propraj automobiloj veturigas ĉiujn al Guebwiller. La blua krestolinio de Vogezoj signas la horizonton kaj la suno estas varma. La aùto de nia eminenta kolego S-ro Albert LIENHARDT surhavas afiŝeton kun nova slogano lia : "PARLEZ-VOUS ESPERANTO", kiu ŝajnas ege efika.

Je la 17a30, en la salono de la urbodomo de Guebwiller, S-ro Wermelinger, la dinamika gvidanto de la Kultura Esperanto-Centro, prezentas centon da diapozitivoj kun surbendigita esperanto-komentario. Temas pri la "Florvalo de Guebwiller", kiun ni tiel sidante vizitas tage kaj nokte, somere kaj vintre : interalie, malnovaj preĝejoj, belaj Vogezaj pejzaĝoj, diversaj industri-aktivaĵoj, neĝkampoj... kaj ankaù la vitkampoj al kiuj ni ŝuldas la fame konatan vinon alzacan. Al ĉi tiu perfekta prezentado eble mankas io pri la cikonioj, kies neston oni vidas almenaù sur unu turo de la preĝejo Sta-Léger.

...

Sekvas unue interesa parolado de la urbestro kaj respondo de Sro Wermelinger, kiu tre lerte klarigas la noblajn celojn de nia movado kaj tiujn de la Kultura Centro. Honorvino finas ĉi tiun sukcesplenan kunvenon.

Je la 20a, en la restoracio Munsch, ĉiuj sidas ĉe longa tablo kaj bone verpermanĝas. Tie regas agrabla etoso, precipe dum la amuza vespero. Teatraĵeto aŭdigas la voĉon de akcidente mort-vundita viro... etendita sur du seĝoj ! .... krome okazas surprizaj ludoj, kantoj ktp...

Iuj tranoktis en la Junulgastejo, kaj aliaj en hoteloj.

Dimanĉon matene, esperante predikis la juna pastro Léonard Schreiber, en la abatejo de Murbach. Restis malmulte da tempo por admiri la Vogezajn pejzaĝojn antaŭ ol denove renkontiĝi en urbodomo, sed ĉifoje en Buhl. En la salono ni admiris freskon 7-metrojn longan, ni aŭdis paroladon de la urbestro kaj la respondon de S-ro Wermelinger kun trafaj argumentoj. Fine : honorvino kaj kukoj.

Je la 12a, ni denove estas en la restoracio Munsch por iom longe sed bonege tagmanĝi. Tie ankaŭ vendiĝis libroj, el kiuj troviĝas unu eksterordinara : "Mi amis junulinon". De tie oni sendis multajn poŝtkartojn, la plej gravan al Prof.Kastler, la honorprezidanto de la tie Kultura Esperanto-Centro.

Posttagmeze, iuj ekskursis tra Vogezaj montoj, dum la ceteraj jam vojaĝis por rehejmiĝi.Sinceran dankon meritas la aŭtoritatuloj, kiuj tiel afable akceptis nin, kaj tiel malkaŝe esprimis sian fidon al Esperanto. Al niaj gesamideanoj alzacaj, ni sendas gratulojn kaj dankojn pro ilia sukcesplena renkontiĝo. Ni ege deziras samgradan sukceson al iliaj diapozitivoj, kiuj vojaĝos tra la mondo por konigi la ĉarmon kaj riĉaĵojn de ilia regiono.

Ankaŭ turismo povas helpi al la prospero de la tiea Kultura Centro, kaj aliparte al la venko de Esperanto.

La plej multaj el ni estas konvinkitaj, ke niaj alzacaj samideanoj sukcesis ne nur plene kontentigi siajn invititojn sed ankaŭ trafe propagandi por nia afero kaj por Alzaco. Ni do reiros al la Florvalo !.

A.B. kaj D.H., Parizo.

--:--:--:--:--:--:--:--:--:--:--

## REMEMORO PRI "LE BONHOMME" kaj "HAÏCOT"

Vespere mi atingis kun Thananoj ĉe Haïcot la rifuĝejon "Les amis de la Nature". Ĝi havis tre komfortan atmosferon similan al Japana monta dometo. Tiun vesperon mi ne povis vidi verdaĵon, ĉar jam la vespero estas iom malluma. Tamen mi vidis ĉe malsupra valo punktajn lumojn multe belajn.

Post manĝo ni, 4 geesperantistoj, faris promenadon, kantante, babilante, kvankam ni povis vidi nenion bone sur tute nekonata senluma montvojeto. Ho ! longa vojo kun ia tremsento. En ĉielo sennombraj steloj.

Post 4 horoj fine ni povis reveni al "HAICOT". En halo Alzacaninoj faris dancojn gaje kun muziko, kiu muziko estis tre ekzotika por mi. Bona atmosfero ! Kaj mi aŭdis multajn kantojn, ankaŭ tiuj kantoj estis bonaj.

Fakte mi dancis kaj kantis multe eĉ ĝis post 3a horo, senkonsciiĝante pri la paso de la tempo !

Dimanĉe estis tre bela vetero. Mi vidis verdplenan monton, valon. Ni iris al submonta vilaĝo, kie mi trovis multajn esperantistojn, saluton ! saluton, saluton ! Mi miris, ke ĉiuj bone parolis nian lingon, kvankam estis iometeta krokodilemo. Tio estis tre bona por mi. Mi pensis, ke por franco lerni esperanton estas tre facile compare al mi japano. Tamen ŝajnas al mi, ke japano ankaŭ pli facile povas lerni esperanton ol alian lingvon. Mi lernis la anglan dum 5 jaroj en lernejo, sed mi ne fariĝis bona parolanto. Aliflanke mi lernis esperanton 1 jaron mem sole, kaj ĝi donis al mi eblecon de vojaĝo al Eŭropo.

Nun mi povas kompreni kaj paroli esperanton pli bone ol la anglan. ...

Kaj ni piede resupreniris kun konversacio aŭ Kanto. Rigardante belan pejzaĝon, estis hela ĉielo, brilanta suno, verdaj arboj, blankaj nuboj. Ankaŭ mi faris kelkajn fotojn. Mi estis tre feliĉa. Post tagmanĝo ĉe HAICOT, ni prenis returnan vojon. Estas tre bone prr Esperanto ke ofte okazas tiaj renkontiĝoj.

...

Tio estis iom longa vojo por mi, kaj Andreo trovis malgrandan belan frukton en herbo ; tiu frukto estis manĝebla (*) do mi ankaŭ manĝis tion. Bongusta ! Eble ĝi estasla gusto de la Alzaca aŭtuno, ĉu ne ? Baldaŭ tempo venis por diri "ĝis revido", Ĉu iam mi povos reveni foje kaj revidi ilin, agrablajn amikojn ? Neforgesebla memorinda tago !

Dank'al esperanto, certe mi povis veni al Francujo tiel ĉi ! Dankon, gesamideanoj de Alzaco ! Ĝis revido !

La 2an de Okt.67 JASUJUKI SUZUKI (Tokio)

(*) tiuj fruktoj estis "mirteloj".

- - - - - - - - - - - - -

KASRAPORTO

- ENSPEZOJ -

| | Fr |
|---|---|
| Saldo je la 1.10.1966 | 443,86 |
| Kotizoj 1966 (2 membroj) | 4,00 |
| Kotizoj 1967 (80 " ) | 126,00 |
| Abonoj al LA INFORMILO | 61,50 |
| Donacoj diversaj ........ | 9,00 |
| Okaze de nia 26a kongreso en Mulhouse, donaco de la prezidanto ............. | 15,00 |
| Kotizoj pagitaj rekte al UFE, parto de la féderacio | 3,00 |
| Tuta enspezo 1967 .... | 662,36 |

- ELSPEZOJ -

| | Fr |
|---|---|
| 4.1.67 Sendkosto de la INFORMILO n° 54 (103 Ekz.) ........... | 11,70 |
| 11.4.67 Sendkosto de la INFORMILO n° 55 (107 ekz.) ........... | 10,85 |
| 10.7.67 Sendkosto de LA INFORMILO n° 56 (232 ekz.) ........... | 19,03 |
| Elspezoj de la federacia sekretario: | |
| Korespondaĵoj dum la jaro 1966 ..... | 27,14 |
| " de la 1.1.67 ĝis la 21.9.67 ........ | 28,10 |
| Sendado de LA INFORMILO al nemembroj kaj eksterlandaj grupoj ......... | 34,48 |
| Sendado de cirkuleroj (ekskursoj, Fed.Infor-Servo, delegitoj de UEA | 6,80 |
| Korespondelspezoj de la kasisto.... | 11,94 |
| Aĉeto de propagandilo ĉe U.F.E. ... | 50,11 |
| Aĉeto de 8 stenciloj por multobligi LA INFORMILON................... | 6,80 |
| Elspezo okaze de la 25a federacia kongreso 1966 en Sélestat ....... | 10,00 |
| Tuta elspezo 1967 | 216,95 |

| | |
|---|---|
| Enspezo 1967 : | 662,36 |
| Elspezo 1967 : | 216,95 |
| Bonhavo he la 30.9.67 : | 445,41 |

La Kasisto : J.CHAPELLIER.

-Noto de la Sekretario : La ĉi-supra raporto entenas la elspezojn por la starigo de la Federacia Informservo, ĉirkaŭ 65 Fr (propagandiloj, parto de la korespondaĵoj kaj cirkuleroj).

*************************

Deziras korespondi : JAPANUJO : Sro MIJOŜI TOMIOKA - 859-1 ŜHIMOSATOMI - HARUNA -GUMMA-KEN 14-jara knabo, lernanto de meza lernejo, déziras korespondi kun francaj junuloj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

INDONEZIO - Sro LIE TJOAN LIANG - Djl.MANGGA BESAR VII/15 - DJAKARTA VI/I deziras kontakton kun filatelistoj en Francujo por interŝanĝi kompletajn seriojn de poŝtmarkoj.

## COTISATIONS 1968

| | Membres âgés de : plus de 21 ans | Membres âgés de : moins de 21 ans (indiquez votre date de naissance) |
|---|---|---|
| 1/- Membre Etudiant ou Jeune ................ | - | 2,50 Fr |
| 2/- Membre adhérent de U.F.E. et U.E.A........ | 5,- Fr | - |
| 3/- Membre "Junior"(jusqu'à 21 ans) .......... (reçoit "Franca Esperantisto") | - | 8,- Fr |
| 4/- Membre titulaire ........................ (reçoit "Franca Esperantisto") | 20,- Fr | - |
| 5/- Membre individuel de U.E.A. (M.J.) ....... (comme ci-dessus, reçoit en plus l'annuaire avec adresses des délégués et des organisations espérantistes). | 37,50 Fr | 17,- Fr |
| 6/- Membre individuel de U.E.A. (M.A.) ....... (reçoit en plus la revue ESPERANTO) | 55,- Fr | 35,- Fr |

Tous les membres reçoivent la carte de U.E.A. et les coupons donnant droit aux services des délégués. Les membres 1 & 2 reçoivent le bulletin trimestriel "Espéranto-Actualités".

Dès réception de votre cotisation vous recevrez la Membrokarton de U.E.A. pour les nouveaux adhérents et la Membromarkfolion 1968 dont la vignette (imprimée dans le bas) est à découper et à coller dans le cadre réservé de la Membrokarto.

Les cotisations sont à adresser au C.C.P. du Trésorier Fédéral en ajoutant 1 F. pour l'abonnement à LA INFORMILO :

J. CHAPELLIER -109, avenue de la Malgrange - 54-JARVILLE.
C.C.P. 399-75 NANCY

Sauf pour les membres du Groupe de Strasbourg, qui sont priés de vouloir bien payer à leur trésorière :

Madame J. OEHRI - 24, rue des Sarcelles - 67-STRASBOURG-NEUHOF
C.C.P. 306-58 STRASBOURG.

en y ajoutant la cotisation du groupe dont le montant est de 5 F.

*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*

Deziras korespondi : POLLANDO : NADIAN BUDY - POSTKESTO 284 - BIELSKO-BIALA woj. KATOWICE deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn.

VLADYSLAV VALCAK-UL BOHGETTA 10/1 - ZIEBICE - 23-jara priakva teknikisto, deziras korespondi.

---

Pro manko da loko, la neaperintaj artikoloj aperos en la venonta INFORMILO, t.e. :

Nia vivo en :

- Voĉo el Florivalo
- Strasbourg.
- Thann.
- Bruyères.

-oooooooooooooooooooo-

Deziras korespondi : RUMANUJO - Prof. Lucia ALEKSA - Str. Bujoreniwi, 31
Blok F 7 S karo 5- et I- ap.80 BUKUREŜTI
23 jara profesorino